

# Eŭropa Bulteno

---

Marto 2012, Numero 114

---

## CIVITANA INICIATO DE EEU: REKOMENDO KANTI LA EŬROPAN HIMNON EN ESPERANTO

Komence de aprilo 2012 ekis tute nova ĉapitro en la historio de EU – ebleco por civitanoj influi rekte la politikajn decidojn de 27-landa EU kun pli ol 500 milionoj da homoj. La Traktato de Lisbono, kiu ekfunkciis decembre 2009, donis rajton al 1 miliono da civitanoj, kiuj loĝas en almenaŭ 7 EU-landoj, prezenti proponon por pliefikigi la funkciadon de la EU-Traktatoj, kondiĉe ke ĝi estas ene de la kompetentoj kiujn donas la EU-Traktatoj al la Eŭropa Komisiono.

Post longa prilaborado en la Eŭropa Parlamento, la Komisiono kaj la Konsilio tiu nova rajto de civitanoj ekfunkciis la 1-an de aprilo 2012 (tute ne ŝerco, malgraŭ la artikoloj de certaj ŝercemuloj). 50 minutojn post la noktomezo tiun tagon, EEU uzis la okazon fari sian proponon, ke:

*“EU rekomendu la kantadon de la eŭropa himno en la neŭtrala lingvo Esperanto, laŭ la ĉi-kunaj vortoj de Umberto Broccatelli, kiam reprezentantoj de Membroŝtatoj volas kune esprimi sian apartenon al komuna samrajtiga Eŭropo.”*

La celoj de tiu ĉiu civitana iniciato estas:

- 1) helpi plifortigi komunan eŭropan identecon harmonie kun naciaj, regionaj kaj aliaj identecoj, kaj tiel pliefikigi EU-n por civitanoj;
- 2) pliiigi la partoprenon de la civitanoj en eŭropa integriĝo;
- 3) helpi atingi (1) kaj (2) per vortoj de neŭtrala, tut-eŭropa lingvo por ebligi al civitanoj kanti kune;
- 4) sekurigi la samecon de respekto por ĉiuj eŭropaj lingvoj;
- 5) rekonfirmi kaj reekvilibrigi la du elementojn de la moto de EU, “unuiĝo en diverseco”, por certigi ke oni ne tro substreku diversecon nek maltro unuiĝon.

Strikte teknike ne estas EEU kiu faras la proponon, ĉar organizaĵo ne rajtas fari proponon – nur civitanoj. Sed organizaĵo povas subteni, kaj la propono bezonos la fortan subtenon de EEU kaj de ĉiuj landaj asocioj de UEA en la 27 EU-landoj. Inter la 7-membra komitato de subtenantoj, kiuj devas laŭ la reguloj loĝi en 7 malsamaj EU-landoj, estas la **Nobelpremiito Profesoro Reinhard Selten** el Germanio, kaj la konata politikisto, **Marco Pannella** el Italio. La aliaj membroj de la komitato estas Angela Tellier el Britio (anstataŭantino de kontakthomo



por la Komisiono), Seán Ó Riain (kontakthomo por la Komisiono), Georgo Handzlik el Pollando, Aleks Kadar el Francio kaj Jesus Miguel Garcia Iturrioz el Hispanio. Ĉar estas limo de 7 homoj por fari subtenan komitaton, la estraro de EEU decidis ke pli saĝas havi 1 loĝanton en la 6 plej grandaj EU-landoj, ĉar ili kune havas ĉirkaŭ 340 milionojn da loĝantoj, kaj Seán Ó Riain, kiu loĝas en Bruselo, por kunordigi la laboron.

La tekston de la tradicia eŭropa himno de EEU, laŭ la vortoj de nia karmemora antaŭa prezidanto de EEU, Umberto Broccaetlli el Italio, oni povas aŭskulti ĉe [www.europo.eu/eo/euhropa-himno](http://www.europo.eu/eo/euhropa-himno), kie estas tradukoj al ĉiuj 23 oficialaj lingvoj de EU, kaj plia al la kroata, kaj al pluraj regionaj, malplimultaj lingvoj kaj mondaj lingvoj (la ĉina, araba, rusa, japana, hindia, bengala, indonezia). Aliaj tradukoj bonvenas, sed jam havi 39 tradukojn el tiom da mondopartoj certe impresos ne-esperantistojn.

La Eŭropa Komisiono nun havas 2 monatojn, precize ĝis la 31-a de majo, por decidi ĉu ĝi akceptos registri la proponon. Se la Komisiono akceptos ke la propono de EEU fakte helpas la funkciadon de la EU-Traktatoj kaj ke fari tian proponon estas ene de la povoj de la Komisiono, EEU komencos kun arigado de 1 miliono da subskriboj en la 27 EU-landoj por ebligi al la Eŭropa Komisiono politike konsideri tian leĝan proponon. Estos precize 1 jaro por arigi la subskribojn. Eĉ se estas 1 miliono da subskriboj, la Komisiono ne estas devigata akcepti la proponon, sed ĝi ja estas devigata serioze konsideri ĝin, kaj se ĝi rifuzas la proponon, la Komisiono devos publikigi la kialojn por tiu rifuzo. Gravus substreki ke oni povos subskribi rete kaj mi antaŭvidas ke tiel ni arigos la plimulton de subskriboj.

Se la Komisiono registros la proponon de EEU, mi ŝatus apelacii al ĉiuj landaj asocioj de UEA en la EU-landoj, kaj fakte al ĉiuj membroj de la landaj asocioj, plenergie subteni ĉi-tiun iniciaton, ke ni vere sukcesu arigi 1 milionon da subskriboj. Ne temas pri eŭropistoj kaj la tiel nomataj tutmondistoj: temas pri ŝanco fari grandegan antaŭenpaŝon por Esperanto en unu grava parto de la mondo – ĉiu liberu por helpi tiun progreson, aŭ ne helpi ĝin. Tia sukceso en Eŭropo forte kuraĝigos niajn samideanojn en aliaj mondopartoj, ekzemple en Ĉinio, Japanio kaj Brazilio, progresigi Esperanton en tiuj mondopartoj. Zamenhof klare kaj saĝe skribis ke sukceso venos “paŝon post paŝo, post longa laboro”, kaj ne “per unu saltego”. Ni estu realistoj!

Submeti la proponon estis sufiĉe granda laboro, aparte verki malnetan juran akton de EU de 11 paĝoj (mi elkore dankas al sperta juristo kaj esperantisto en la Eŭropa Parlamento, Guido Ricci, pro lia helpo en tio). La laboro simple ne eblus sen la malavara kaj efika subteno de pluraj Esperantistoj – ekzemple Maja Tišljarić, Angela Tellier, Flory Witdoeck kaj Jozef Reinart estis en senĉesa reta kontakto kun mi dum la lastaj tagoj de marto samkiel la tuta estraro de EEU. Mi elkore dankas al ĉiuj kunlaborantoj, al la estraro de EEU, al miaj 7 kunkomitatoj, al ĉiuj kiuj tradukis la gazetaran komunikilon (<http://www.europo.eu/eo/gazetaraj-informoj>) al la propra lingvo. Ni esperu sukceson! Sed eĉ pli grave, ni laboru por sukceso!

Seán Ó Riain

## INVITO TRADUKI LA SUBAN TEKSTON AL NACIAJ LINGVOJ

### Gazetara informo

#### Civitana iniciato de Eŭropa Esperanto Unio (EEU) „Rekomendo kanti la eŭropan himnon en Esperanto“

EEU hieraŭ utiligis rajton, kiun ebligas la Traktato de Lisbono al civitanoj, prezenti siajn proponojn por pliefikigi la funkciadon de la EU-Traktatoj kaj sendis al la Eŭropa Komisiono por registro sian proponon, ke:

*“EU rekomendu la kantadon de la eŭropa himno en la neŭtrala lingvo Esperanto, laŭ la ĉi-kunaj vortoj de Umberto Broccatelli, kiam reprezentantoj de Membroŝtatoj volas kune esprimi sian apartenon al komuna samrajtiga Eŭropo.”*

La celoj de tiu ĉiu civitana iniciato estas:

- 1) helpi plifortigi komunan eŭropan identecon harmonie kun naciaj, regionaj kaj aliaj identecoj, kaj tiel pliefikigi EU por civitanoj;
- 2) pligrandigi la partoprenon de la civitanoj en eŭropa integriĝo;
- 3) helpi atingi (1) kaj (2) per vortoj de neŭtrala, tut-eŭropa lingvo por ebligi al civitanoj kanti kune;
- 4) sekurigi la samecon de respekto por ĉiuj eŭropaj lingvoj;
- 5) rekonfirmi kaj reekvilibrigi la du elementojn de la moto de EU, “unuiĝo en diverseco”, por certigi ke oni ne tro substreku diversecon nek maltro unuiĝon.

Inter la 7-membra komitato de subtenantoj loĝantaj en 7 malsamaj EU-landoj estas la **Nobelpremiito Profesoro Reinhard Selten** el Germanio, kaj la konata politikisto, **Marco Pannella** el Italio.


La tekston de la tradicia eŭropa himno de EEU oni povas aŭskulti ĉe [www.europo.eu/eo/europa-himno](http://www.europo.eu/eo/europa-himno), kie estas tradukoj al ĉiuj 23 oficialaj lingvoj de EU, al la kroata, kaj al pluraj regionaj, malplimultaj lingvoj kaj mondaj lingvoj (la ĉina, araba, rusa, japana, hindia, bengala, indonezia). Aliaj tradukoj bonvenas.

La Eŭropa Komisiono nun havas 2 monatojn por decidi ĉu ĝi akceptos registri la proponon. Se la Komisiono akceptos ke la propono de EEU fakte helpas la funkciadon de la EU-Traktatoj, kaj ke fari tian proponon estas ene de la povoj de la Komisiono, EEU komencos kun arigado de 1 miliono da subskriboj en la 27 EU-landoj por ebligi al la Eŭropa Komisiono konsideri tian leĝan proponon. Gravus substreki ke oni povos subskribi rete.

Por pliaj informoj kontaktu [sean.oriain@web.de](mailto:sean.oriain@web.de) (0032496-597763) aŭ [jozef.reinvart@gmail.com](mailto:jozef.reinvart@gmail.com).

Bruselo, la 2an de aprilo 2012

## NIAJ LANDAJ MOVADOJ ESPERANTO EN SLOVAKIO



### KOMENCO

La unua lernolibro de Esperanto por slovakoj aperis en la jaro 1907. Eldonis ĝin la tolstojano D-ro Albert Škarvan kun la ruso N.P. Evstifejev. Ĝi estis slovaka traduko de la unua lernolibro de Esperanto, "La Fundamento" de Zamenhof. Ĝi aperis en la tiama Turčiansky Svätý Martin (nun Martin), la dua eldono aperis en 1918 en Chicago. (Okaze de la 100-jariĝo de Esperanto en Slovakio aperis en la jaro 2007 tria eldono de la libro, en senŝanĝa formo, en nuraj 100 ekzempleroj).

En la nuna ĉefurbo de Slovakio Bratislava (antaŭe Pozsony, Pressburg) estis baldaŭ fondita Loka esperantista grupo de István Nagy-Molnár kaj Emil Wanitsek.

### EL LA KOMUNA HISTORIO

La 1-an de februaro 1920 estis fondita Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. Ekde 1921 komencis aperadi en Praha la monata gazeto en ĵurnala formato Ĉeĥoslovaka Gazeto. En 1923 fondiĝis Ĉeĥoslovaka E-Instituto kaj en 1926 okazis en Bratislava la 3-a kongreso de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

### POST LA DUA MONDMILITO

La 13-an de marto 1946 estis fondita **Slovakia Esperanto-Societo**. Ĝia prezidanto estis (1947-1953) Pavol Rosa.

En la sama jaro komencis aperadi *Esperantisto Slovaka*, revuo de esperantistoj en Slovakio. Fondis ĝin Ernesto Váňa.

En 1951 ĝi ĉesis aperi, ĝis 1957, kiam ĝi reaperis sub la nova nomo *Esperanto en Slovakio*. La revuo kelkfoje ŝanĝis sian nomon (1960-1962 *Esperanto*, 1963-1967 *Esperanto-Agado*). En la jaro 1968 oni revenis al la nomo *Esperantisto Slovaka*.



En la jaro 1947, de la 12-a ĝis la 13-a de julio 1947, okazis en Martin la **Unua Tutslovakia Esperanto-Kongreso** (vidu [http://100.esperanto.sk/fotogaleria/prvy\\_kongres.php?jazyk=eo](http://100.esperanto.sk/fotogaleria/prvy_kongres.php?jazyk=eo)). La Dua Tutslovakia Esperanto-Kongreso okazis en Košice, ekde la 21-a ĝis la 23-a de aŭgusto 1948, la tria okazis en 1949 en

Bratislava. En 1953 estis Slovaka Esperanto-Societo likvidita.

En 1969, de la 9-a ĝis la 11-a de majo, okazis en la hotelo Esperanto en Pribylina kongreso de slovakaj esperantistoj, dum kiu estis fondita **Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR)**. Inter la jaroj 1969 kaj 1990 AESSR okazigis 12 kongresojn en diversaj urboj de Slovakio. Ĝiaj prezidantoj estis Pavel Rosa (1969-1977), Milan Zvara (1977-1983 kaj 1987-1990), Andrej Lukáč (1983-1987) kaj Augustín Čambál (1993-1994). Dum la 12-a kongreso en 1993 en Žilina estis la nomo ŝanĝita al **Slovakia Esperanto-Asocio**, kiu havis multajn jarojn sian propran sidejon en la subtatra urbo Poprad (la urboparto Spišská Sobota).

En 1997 okazis en la hotelo Esperanto en Pribylina fonda kongreso de la nova asocio - **Slovakia Esperanta Federacio (SKEF)**. Ĝiaj prezidantoj: Juraj Gondžúr (1997-1998), Ján Vajs (1998-2001), Milan Zvara (2001-2004), Juraj Gondžúr (2004-2007), Rast'o Šarišský (2007-2010) kaj Stano Marček (2010-...). SKEF estas Landa Asocio de UEA. Ĝi havas Esperantan arkivon en la vilaĝo Plevník. En ĝi troviĝas postlasaĵo de slovakaj esperantistoj de: Arnošt Váňa, Milan Zvara, Vladimír Němec, Eduard V. Tvarožek, Martin Benka kaj aliaj. En la arkivo, pri kiu zorgas Ľubomír Fajth, estas pli ol 2.000 libroj kaj esperantaĵoj.



#### NUNTEMPE

**Slovakia Esperanta Federacio, SKEF**, havas kolektivajn kaj individuajn membrojn. La kolektivaj estas membroj de regionaj organizoj (Esperanta Societo ESO, Okcidentoslovakia E-Societo OSES, Nordslovakia E-Societo ESONO) kaj Esperanto-kluboj, nuntempe en Liptovský Mikuláš, Žilina, Martin, Považská Bystrica, Snina kaj Zvolen. La individuaj membroj aliĝas kaj pagas sian membrotizon rekte al SKEF.

Kiel sendependa interesorganizo kaj jura personeco SKEF estas registrita ĉe Ministerio de Internaj Aferoj de Slovakio. Ĝia sidejo estas ĉe la nuna prezidanto Stano Marček ([stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com)). Ĝia retejo: <http://esperanto.sk/eo>

**Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)** estas memstara civitana asocio de gejunuloj. Ĝi ekestis la 13-an de aŭgusto 2003. Ekde 2004 ĝi estas Landa Sekcio de TEJO. Ĝia retejo: [www.skej.esperanto.sk](http://www.skej.esperanto.sk)



En Slovakio havas juran sidejon ankaŭ la organizo **E@I** (Edukado ĉe Interreto) [www.ikso.net](http://www.ikso.net), kun multaj internaciskalaj aranĝoj kaj projektoj kiel [lernu.net](http://lernu.net), [aktuale.info](http://aktuale.info), [sl ovake.eu](http://sl ovake.eu), [vortaro.net](http://vortaro.net), Somera E-Studado, KAEST k.a., kun propraj salajrataj dungitoj kaj kun oficejo en la urbo

Partizánske.

Pri elstaraj slovakaj esperantistoj (ekz. Ľudovít Izák, Pavel Rosa, František Šatura, Eduard Vladimír Tvarožek, Ján Valašťan-Dolinský, Arnošt Váňa, Milan Zvara, Magda Šaturová-Seppová, Albert Škarvan) informas

Wikipedio: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Slovakaj\\_esperantistoj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Slovakaj_esperantistoj).

**Esperantisto Slovaka** (<http://esperantistoslovaka.esperanto.sk/>) nun aperas kvaronjare, sub la redaktado de Peter Novotníček ([esperantistoslovaka@gmail.com](mailto:esperantistoslovaka@gmail.com)).

## INSTRUADO

En Slovakio estas forta tradicio de Someraj Esperanto-Lernejoj – en Jasov, Sliač, Dedinky-Mlynky kaj Košice (ligitaj kun la karmemora Milan Zvara), lastatempe Somera Esperanto-Studado en Pribylina, Modra, Piešťany kaj Nitra, kiun organizas [lernu.net](http://lernu.net) kaj [E@I](mailto:E@I), helpe de SKEJ ([www.lernu.net/ses](http://www.lernu.net/ses)).

La plej aktiva enlanda instruisto nuntempa estas Mária Minichová en Bratislava, kiu gvidas kursojn kaj por infanoj, kaj por plenkreskuloj. En Žilina instruas E-on Magda Fejfičová. Sufiĉe multnombra estas ankaŭ slovaka komunumo de lernantoj ĉe [lernu.net](http://lernu.net).



## ELDONA AGADO

Eldonado de E-materialoj ankaŭ havas longan tradicion. En la nuna tempo ekzistas eĉ du viglaj eldonejoj de esperantaĵoj, agantaj internacie – eldonejo ESPERO ([www.espero.sk](http://www.espero.sk)) de Peter Baláž kaj eldonejo de Stano Marĉek, kiu krom diversaj aliaj eldonaĵoj sukcesis eldoni sian lernolibron „Esperanto per rekta metodo“ jam en 30 lingvoj!

Ankaŭ unuopaj E-kluboj de tempo al tempo eldonas librojn, broŝurojn. La plej aktiva en la eldona agado estas la Liptova Esperanto-Klubo (LEK). Kiel sian unuan kontribuon al la festado de 125-jariĝo de Esperanto eldonis slovakaj E-istoj decembre 2011 slovakon tradukon de la verko de A.Korĵenkov „Vivo de Zamenhof“ (Život Zamenhofa).

Stano Marĉek, Peter Baláž, Katarína Nosková



## EŬROPA ESPERANTO KONGRESO – NOVA SUKCESO

La oficejo de ĝenerala sekretario de la prezidanto de Irlando, Micheál D. Ó hUiginn, sendis al EEU oficialan leteron kun la akcepto de la prezidanto iĝi alta protektanto de la 9-a Eŭropa Esperanto-Kongreso de EEU kiu okazos de la 16-a ĝis 20-a de julio en Irlanda urbo Galivo (Gaillimh/Galway).

Aliĝu ankoraŭ ĝis la 15-a de aprilo plilongigite laŭ rabatita kotizo!

## LA JARO DE TIBOR SEKELJ

### PRELEGO PRI TIBOR SEKELJ EN KATMANDUO

Dum la unua sudazia seminario (SAS) okazinta komence de marto en Katmanduo okazis interalie la 3-an de marto prelego de Bharat Ghimire pri Tibor Sekelj, okaze de la 100-jara jubileo de lia naskiĝo. Li resumis la libron de Sekelj pri Nepalo titolitan “Nepalo malfermas la pordon”. Tibor Sekelj profunde traktis la nepalajn popolon, historion, geografion, religiojn, artaĵojn, vivmanieron, etnojn, lingvojn ktp. La verko ankoraŭ estas leginda kaj por

eksterlandanoj kaj por nepalanoj. Fakte la verko estas unu el la plej gravaj libroj skribitaj de eksterulo pri Nepalo. Sekelj klare mencias ke li instruis Esperanton al tiamaj famuloj en Nepalo, inkluzive al la reĝo de Nepalo Mahendra kaj la plej granda poeto de la lando, Lakshmi Prasad Devkota.

Bharat Ghimire

## FESTA ARANĜO EN ZAGREBO

Kadre de la festo de la programo de 2012 kiam Esperanto atingis sian 125-jariĝon, Kroata Esperanto-Ligo okazigis la 23an de marto belan memorgesperon pri Tibor Sekelj, uzinte la ejon de la urba oficejo por planado kaj evoluo de Zagrebo. Sesdeko da homoj kolektiĝis por ĉeesti ne nur prelegon pri Tibor Sekelj prezentita de Judita Rey Hudeček kaj Spomenka Ŝtimec sed ankaŭ por partopreni la lanĉon de la korea eldono de la romano pri Kumeŭaŭa - filo de la ĝangalo. La korea eldono de la libro aperis en la urbo Seulo en traduko de Ombro Jang. Fragmenton el la libro legis Nara Han el Korea Ambassadejo en Zagrebo. Kroatajn fragmentojn legis Đivo Pulitika. Kantis koruso de Kroata-makedona societo kaj operkantisto Neven Mrzlečki. Ĉeestis interalie tri reprezentantoj de Ambassadejo de Respubliko Serbio en Kroatio. La venonta programo pri Tibor Sekelj en Kroatio estas planata en majo kadre de la Meteorita festo en Hrašćina. Kroata semajngazeto Globus okaze de la evento dediĉis al Tibor Sekelj sian felietonon sur 7 paĝoj.



Spomenka Ŝtimec

## KATALUNA TRADUKO DE »KOLEKTANTO DE ĈIELARKOJ«

Joan Inglada tradukis al la kataluna lingvo la novelon de Tibor Sekelj »Kolektanto de ĉielarkoj« kaj aperigis ĝin en sia blogo ĉe ipernity.

## LASTA ALVOKO VENI AL TRIESTO, ITALIO



Kiel ni jam informadis, de la 9-a ĝis la 11-a de majo okazos Eŭropa Konferenco »Kia estus Eŭropo nun sen Eŭropa Unio?« en Triesto kies laborlingvo estos ankaŭ Esperanto. Samtempe kun la konferenco okazos la 9-a konferenco de Alp-Adriaj esperantistoj kiu daŭros ĝis la 12-a de majo. Ni invitas ĉiujn interesitojn urĝe anonciĝi. Estas ebloj por junaj E-ĵurnalistoj aŭ studentoj de ĵurnalismo havi senpagan restadon. Jen la programo de la konferenco:

**Programo de la konferenco »Kia estus la nuna Eŭropo sen EU?«****Triesto, 09.05.2012-11.05.2012****Salono Beethoven, via Coroneo 15, Triesto**

Lingva reĝimo: Plenkunvenoj estos en tri lingvoj (angla, esperanto kaj itala) (kiam iu parolos angle, la interpretistoj interpretos en la itala kaj esperanto ktp.). Dum la prelegoj estos uzataj nur du lingvoj (la angla kaj Esperanto krom prelego de Mesić kiu parolos kroate kaj okazos tradukoj al la itala kaj la angla kaj la prelego de Kučan kiu parolos en la slovena kaj la tradukoj okazos al la itala kaj la angla). La laboro en laborejoj estos sen interpretado: unulingva. 4 studentaj laborejoj estos en la angla kaj unu poresperantista en Esperanto.

**9-a de majo, merkredo**

11,00 – 12,00 Konferenco por italaj ĵurnalistoj

15,00 – 16,00 Solena Malfermo:

- paroladetoj de reprezentantoj de dommastroj: regiona, urba, universitata, partnera (TEA)
- enkonduka parolo de Seán Ó Riain, prezidanto de EEU
- kanto de eŭropa himno en Esperanto

**HISTORIA BLOKO**

16,00 – 16,20 Thomas Jansen (iama prezidanto de bloko de kristandemokrataj partioj de la Eŭropa parlamento) prelegas kadre de la historia bloko

16,20 – 16,30 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

16,30 – 16,50 Prof. Božo Repe (profesoro pri historio en Ljubljana): »Slovenio kaj EU«

16,50 – 17,00 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

17,00 – 17,30 Kafopaŭzo

17,30 – 18,15 Diskuto pri historia perspektivo de EU

18,15 – 20,00 **Laborejoj por partoprenantoj** (ĉefe junaj ĵurnalistoj kaj studentoj de ĵurnalismo, sed ankaŭ partoprenantaj esperantistoj) pri la historiaj aspektoj de la ĉeftemo**10-a de majo, ĵaŭdo****POLITIKA BLOKO**

9,30 – 9,50 Stjepan Mesić, iama prezidanto de Jugoslavio kaj Kroatio, prelegas pri politikaj aspektoj de la ĉeftemo



9,50 – 10,00 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,00 – 10,20 Milan Kučan, iama prezidanto de Slovenio, prelegas pri la politikaj aspektoj de la ĉeftemo

10,20 – 10,30 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,30 – 10,50 Prof. dr. Facco Bonetti prelegas pri la politikaj aspektoj de la ĉeftemo

10,50 – 11,00 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

11,00 – 12,30 Prelego de Giorgio Novello,

11,20 – 11,30 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

11,30 – 12,30 Diskuto pri politika perspektivo de EU

12,30 – 14,00 Tagmanĝa paŭzo

14,00 - 15,30 **Laborejoj por partoprenantoj** pri la politikaj aspektoj de la ĉeftemo

### EKONOMIA BLOKO

15,30-15,50 Mladen Staničić, ekonomika fakulo el Kroatio, prelegas pri la ekonomiaj aspektoj de la ĉeftemo

15,50-16,00 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

16,00-16,20 Francois Grin, svisa universitata profesoro prelegas pri ekonomiaj aspektoj de la ĉeftemo

16,20-16,30 Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

16,30-17,00 Kafopauzo

17,00-18,00 Diskuto pri ekonomia perspektivo de EU

*18,00-19,00 Publika Ronda tablo por Triesta publiko kun la eksaj prezidantoj Mesić kaj Kučan kaj Thomas Jansen pri la graveco de EU por konservo de la paco en Eŭropo kaj la mondo – EKSTER LA PROGRAMO POR LA PARTOPRENANTOJ kaj en alia loko, kiun moderatoros sinjoro Sabatti.*

18,30-20,00 **Laborejoj por partoprenantoj** pri ekonomiaj aspektoj



**La konferenco estas financata de la eŭropunia programo Europro por civitanoj.**

**11-an de majo, vendredo****ALIAJ PRELEGOJ**

9,00 - 9,20: Prof. Paolo Alessi, Prezidanto de Centro Unesco de Triesto »Eŭropo kaj problemoj de handikapitoj«

9,20 – 9,30: Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

9,30 – 9,50: Zlatko Tišljar prelegas pri identeca karaktero de lingvoj

9,50 – 10,00: Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,00 – 10,20: Prof. Dr. Orio Giarini prelegas

10,20 – 10,30: Demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,30-11,00 kafopauzo

11,00 -12,00 Eventualaj aliaj prelegantoj

12-13.30 Ferma plenkusido pri la konkludoj de la konferenco: parolado de Seán Ó Riain pri la konferenco kaj konkludoj, diskuto kaj akcepto de la konkludoj, eventualaj lastaj intervenoj, kanto de eŭropa himno, fermo de la konferenco.

Zlatko Tišljar

**GOOGLE INKLUZIVIS AŬTOMATAN TRADUKON ANKAŬ AL KAJ DE ESPERANTO**

Google inkluzivis en marto E-on en sian traduksistemon. Nun la revo fine realiĝis! Tio devus esti la unua reklam-fakto en la venontaj monatoj, kvazaŭ donaco por la 125-a jubileo. La grandega reklama atingo por Esperanto estas ke la plej granda, prestiĝa kaj vaste konata traduk-platformo en la mondo inkluzivis Esperanton en tiu ekskluziva klubo de 64 lingvoj. Tiu-ĉi fakto ne devas manki de kiu-ajn reklama kaj informa teksto pri Esperanto. Kompreneble, la kvalito de la traduko ne estas tre alta, aparte ĉe certaj lingvoj (ekz. la rusa, kiel notas Aleksandro Korŝenkov <http://sezonoj.ru/2012/02/guglo/>, kaj ankaŭ en la hebrea, kiel mi rimarkis uzante ĝin por traduki hebrean la subtitolojn de alia reklama trezoro, La Universala Lingvo de Sam Green, sed tio estas la problemo de ĉiuj aŭtomataj tradukaĵoj, oni kompreneble devas korekti ilin per laboro de homa tradukisto kiu bone regas la cellingvon. La granda avantaĝo de aŭtomata traduko estas ke ĝi provizas la bazan tekston kaj ŝparas multan laboron.

Amri Wandel

**KONGRESO DE FRANCAJ ESPERANISTOJ**

La kongreso de Esperanto France okazos de la 25-a ĝis la 29-a de majo en urbo Saint-Aignan de Grand Lieu apud Nantes (okcidento de Francio).

Vi ankoraŭ ne aliĝis? Ne gravas, restas liberaj lokoj. La kastelo de la Plinguetière bonvenigos vin en belega loko.

Vi povas aliĝi rete ĉe : <http://esperanto-france.org/perso/>

aŭ printi la aliĝilon kaj sendi ĝin al la sidejo de la asocio : <http://esperanto-france.org/IMG/pdf/alighiloNantes2012.pdf>



Programo :

- Prelegoj de Roman Dobrzynski, aŭtoro de Strato Zamenhof
- Prelegoj-koncertoj de Gijom
- Vizito de urbo Nantes kaj de la famaj maŝinoj de la insulo kaj ĝia elefanto
- Vizito de la muzeo Jules Verne (vendredo posttagmeze, alvenu frue)
- Ekskurso en Pornic (marborda urbeto)
- Ekskurso al la lago de Grand Lieu kaj al Saint-Philbert

- Ĝeneralaj asembleoj de Esperanto-France, GEE, FKEA

- Laborgrupoj pri diversaj temoj

kaj multaj aliaj programeroj

Ĉiuj detaloj ĉe <http://esperanto-france.org/nantes2012>

Claude Nourmont

## 73 GEJUNULOJ 11-14-JARAJ DIPLOMIĜIS EN MAZARADDELVALO

La laboro de Centro por Esperanto kaj Interkulturo en Mazaradelvalo pludaŭras.

La 16-an de marto, CEI kune kun la Katedro de Trapano de la Instituto Itala por Esperanto okazigis la unuan ekzamenon por junaj lernantoj en la urbo.

Submetiĝis al la ekzameno tri klasoj de la mezgrada lernejo G. Boscarino, 1F, 2F kaj 3F, sume 73 gelernantoj kiuj akiris la unuan gradon de la scio laŭ nia Instituto.

Krom la instruistoj de la katedro de Trapano, estrata de samideano Nunzio Parisi, ĉeestis ankaŭ Bruĉjo Kasini kaj Michael Boris Mandirola de la Estraro de Itala Esperanto-Federacio, la internaciaj instruistoj Svetlana Smetanina kaj Marta Kovacs, kiuj estas nuntempe instruantaj Esperanton al pli ol 600 personoj en Mazaradelvalo, kaj nia loka juna samideano David Paleino.

Mandirola kaj Kasini trafis ankaŭ la okazon por viziti la grandan gastejon kiun la urbestro metis je dispono de la esperantistoj por la Kongreso kaj por postaj aranĝoj, por kontentigi laŭ absolute minimumaj prezoj la bezonon je loĝado kaj manĝado. Ili ankaŭ sukcesis difini la starton de kurso por la oficistoj de la urbodomo, kiu okazos anstataŭ laborhoroj merkrede kaj vendrede.

Plue, parolante kun la estroj de kelkaj lernejoj, ili difinis ke unu el la vesperaj kongresaj spektakloj estos plenumita de la infanoj de pluraj lernejoj en kiuj nun oni instruas Esperanton.

Bruĉjo Kasini

## NOVAĴOJ PRI LA ITALA E-KONGRESO EN MAZARADELVALO



Granda gastejo urbocentre je dispono de la kongresanoj. Koncertoj ĉiutage en centra urboplaco ĉe la maro. Pli ol 500 lernantoj en la urbaj lernejoj. 60 eŭroj por la tuta kongreso, programo kaj loĝado dum plenaj 7 tagoj. Laŭ persona iniciato de la urbestro de Mazara del Vallo, Nicola Cristaldi, la urbo Mazara del Vallo provizas al la esperantistoj okaze de ilia 79a Kongreso de Esperanto en Italujo de la 18a ĝis la 25a de aŭgusto 2012, la tutan konstruaĵon Gastejo Sankta Agostino,

planata por gastigi rifuĝintojn kaj helpobezonajn personojn. La gastejo povas provizi simplan loĝadon al pli ol 200 personoj, ĉu per litoj ĉu per dormosakoj, troviĝas en la urbocentro, 800 metrojn, dek minutojn piede de la kongresejo, kiu estas la ĉemara Hotelo Hopps, la plej granda en la urbo. En Mazara del Vallo nuntempe jam pli ol 500 infanoj de preskaŭ ĉiuj lernejoj de la urbo sekvas kurson de Esperanto, provizita per la helpo de internaciaj volontuloj, Szabi, Konstantin, Marta, Svetlana. En venontaj semajnoj komenciĝos pliaj kursoj kaj por infanoj, kaj por junuloj kaj por plenkreskuloj, inkluzive unu por la oficistoj de la urbodomo kaj kelkaj por la instruistoj de la urbaj lernejoj. La LKK de la 79a kongreso ofertas la malmultekostan gastejon al ĉiuj esperantistoj je la simbola prezo de 30 eŭroj por la tuta septaga kongreso: tiuj, kiuj jam aliĝis al la kongreso, povas ĝin mendi per retmesaĝo al la adreso [kongreso@esperanto.it](mailto:kongreso@esperanto.it). Al Mazara del Vallo oni tre facile alvenas tra la flughavenoj de Trapani (TPS) servita de malmultekostaj kompanioj, kaj de Palermo (PMO). Ankaŭ eblas alveni prame el Ghenovo, Livorno, Civitavecchia, Napolo, Salerno, Kaljaro, Tunizo kaj, kompreneble trajne ([www.fsitaliane.it](http://www.fsitaliane.it)) kaj buse ([http://www.autoservizisalemi.it/cerca\\_linea.php](http://www.autoservizisalemi.it/cerca_linea.php) el Romo, Napolo, Milano, Bolonjo, Florenco).

Bruĉjo Kasini

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

**Finredaktita: la 31-an de marto 2012**

**Redaktoro: Zlatko Tišljarić**

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Stano Marček, Peter Baláž, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljarić, Bruĉjo Kasini, Bharat Ghimire, Claude Nourmont, Amri Wandel.

**Kontakto:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

